

& Adiaŭa vorto de la reĝino:

< Rekante 17 el 35 batoj por strofo, entute 210 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Marie Hankel (1910; Sableroj, Leipzig 1911). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(#: <:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa (#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mi; mi3re doTi rere mi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a;))×6)+

(&Strofoj:

'1 Nun la bela jaro pasis, ; Ĉarma revo,
kora ĝojo! ; Ĝi postsignojn gajajn lasis,
; Floroj kreskis sur la vojo!

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun rakonton ;
Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon
paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma
ponto.)**

'2 El la vasta regiono ; Multaj laŭdoj
kaj gratuloj ; Venis al la reĝa trono ; De
sindonaj la subuloj.

'3 Ĉu, songante mian revon, ; Ĉiam
bone mi regadis? ; Kaj plenumis mian
devon, ; Dum aliaj bataladis?

'4 Por batalo kaj laboro ; Premas kore
min la manojn, ; Dankon sentas mia
koro: ; Mi amegas la regnantojn!

'5 Ĝoje sonu mia kanto, ; Entuziasme,
kun adoro, ; Por la kara Esperanto, ;
Nia beno kaj trezoro.

'6 Mi reĝino ne plu estos - - ; Pasis jam
la bela jaro! ; Membro mi humile restos
; De la diligenta aro. -